

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, War-
szawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edin-
burgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
H. Fischer, grandindustri-
isto, București (Rum.)
Teo Jung, Köln (Kolonojo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirek-
toro, Kaunas (Kovno)
Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Postsekonto Köln 70663, por
Teo Jung, Horrem.
Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Literatura rcd.: Zanon.

ESPERANTO

TRIUMFONTO

La eldonado de monato
100-paĝa
Revuo
bone redaktata, arte
presata kaj riĉe ilustr-
ata estas por ni pli
simpla, pli facila kaj
multe malpli riska en-
trepreno ol la eldonado
de semajna ĵurnalo.
Pripensu tion, se io je
ET ne plene kontenti-
gas vin!

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpigo de la sumo. Pri finigonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpaga por ET-abonantoj.

Prezo de unu numero por la landoj kun kolonioj:
Argent. 0.15 Peso Ĉeĥosl. 1.20 Kr. Germana 600 Mk. Kanada 0.06 Dol. Portug. 0.60 Esk.
Aŭstra 1500 Kr. Eston. — (Abonu nur ĉe poŝticejo) Latva — Rumana 4 Leol.
Belga 0.65 Fk. Finna 120 Fmk. Litova 30 Cd. Rusa 300 Gmk.
Brazilia 0.400 Mr. Franca 0.60 Fk. Italia 0.40 Lit. Nederl. 0.18 Hfl. Sveda 0.24 Kr.
Brita 3/4 Pc. Hispana 0.30 Pes. Japano 0.10 Yen. Norvega 0.30 Kr. Sviza 0.30 Fk.
Bulgara 4 Levol. Hungara 60 Kr. Jugosl. 2.50 Din. Pola 300 Mk. U. S. A. 0.06 Dol.

Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.
Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 avisa frankon (aŭ ĉe antaŭpago 200 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

N-o 126 :: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 4. III. 23.

La dua milo plena.

Jam 2000 partoprenontoj anoncis sin ĝis mezo de februaro por la XV-a Kongreso de Esperanto.

Fino de Debato pri ET.

Ne paroli, sed agi!

En la lastaj monatoj ekestis vigla debato inter ni kaj multaj legantoj pri ET kaj ĝia estonteco. Diversajn artikolojn ni publikigis pri tiu temo, kaj tre ampleksaj estas tiaj korespondantoj pri ĝi. Ni mem donis sufiĉe da pruvo pri nia bonvolo laŭeble pliperfektigi ET-on, kaj niaj amikoj donis al ni multe da bonvolaj konsiloj, por kiuj ni kore dankas. Specialan dankon ni ŝuldas al la Esp. Centro Rumana, kaj ni esperas, ke kelkajn el ĝiaj instigoj ni povos efektiviĝi. Tamen ni ankaŭ ne forgesu refuti kelkajn nemeritajn riproĉojn. Ekzemple, ni ne povas ne malĝoĝi, kiam iu leganto asertas, ke ET — anstataŭ perfektigi — konstante malboniĝas (?); kiam alia skribas, ke iam ET estis pli aktuala ol nun sed ke nun la eldonaĵoj de Int. Labora Oficejo estas pli aktualaj (tio almenaŭ estas ĝeneraligo, ĉar I. L. O. raportas nur el sia propra sfero); aŭ kiam iu sinjorino deklaras, ke la literatura parto de ET estas tiel naŭva, ke ĝi diskreditigas nian movadon (?).

Ankaŭ estas maldolĉa por ni la tute maljusta komparo de ET kun naciaj ĵurnaloj koncerne prezon, amplekson, kvaliton de enhavo k. s. Kiam la Esp. movado estos tiel forta, ke ET havos 50 000 abonantojn kaj en ĉiu numero dekon da pagoj da bone pagataj anoncoj, ĝi estos same malkara, same ampleksa kaj same bonenhava kiel nacia ĵurnalo. Cetere, la samaj legantoj, kiuj pleonas pri multekosteco de ET, pagus senhezite la kvaroblajn prezojn por 100-paĝa monata revuo, ne pripensante, ke la eldonado de 100-paĝa monata revuo estus por ni multe pli simpla kaj pli profitdona entrepreno ol la eldonado de ĉiusemajna 4-6-paĝa ĵurnalo. Ni ripetis, ke ĝis nun ET ekzistis grandparte pro la favoraj por ĝi valutaj cirkonstancoj. Sed estas nia deo ĝustatempe konsideri antaŭrimedojn, por ke ET povu ekzisti daŭre, ĉar ĉesigo de la semajna ĵurnalo rezultigus nemezureblan damaĝon por nia movado. Kaj la deo de la legantoj estas doni al ET la modestajn vivrimedojn, kiujn ĝi nepre bezonas; eĉ malbonvalutuloj devas laŭpove helpi je tio.

Tiom pri la prezo. Nun pri la enhavo. Jen antaŭ ĉio ni devas atentigi pri la manko de mono por pagi bonajn honorariojn. Dum ET ne havos 10 000 abonantojn, ni ne povos pensi

artikoloj, kiuj estas riceveblaj sen honorario. Tamen pliperfektigo de la enhavo de ET estas ebla: kiam nia nova presmaŝino kaj la menditaj novaj preslitoj estos alvenintaj, ni povos pli

legantaro ja estas la ĉefa redaktanto (ne ĉefredaktoro) de ET; kaj, ricevante multajn kaj bonajn artikolojn, ni povas elekti la plej bonajn. Lastatempe la kunlaborado bedaŭrinde malvigligis, nia manuskriptaro konsiderinde konsumiĝis, kaj nia elekto jam ne estas granda. Do, kunlaborantoj denove estas dezirindaj. Tamen oni ne plu skribu tiom pri ET, sed por ET! Ni mem ankaŭ intencas ne plu paroli tiom pri la gazetara demando, sed simple agi. Eble la legantojn eĉ jam tadas tiu temo.

En n-o 124 ni ankoraŭ publikigis artikolon de s-o Hevesi pri ET, ne ĉar ni konsentis kun la aŭtoro, sed por montri, ke ni ne timas kritikon. Ĉi-tio sekvas nia respondo.

Nia konkludo el la tuta debato estas tio, ke la opinioj de la legantoj estas tro diferencaj, por ke oni povu kontentigi ĉiujn dezirojn. El la granda amaso da bonaj konsiloj, instigoj, deziroj kaj kritikoj ni utiligos tion, kio ŝajnas al ni utiliginda kaj utiligebla, kaj la resto — dormu en paco. La loko, ĝis nun okupita per artikoloj pri ET mem, de nun plenu per pli interesaj artikoloj. Kunlaboremuloj sendu siajn manuskriptojn!

Fine kelkaj rimarkigoj pri la artikolo de s-o Hevesi en n-o 124:

Alineo 1. — Ni forigis nur la vorton „neŭtrala“ de la titolo (pro teknika kaŭzo), kaj jam kuŝis sur nia redakcia tablo demando, ĉu ET intencas fariĝi „germanema“. La artikolo „Karnavalo“ en n-o 122 jam estis rigardata de kelkaj francaj samideanoj (felice ne de multaj) kiel rompo de neŭtraleco! Por forigi ĉian dubon pri la neŭtraleco de ET, ni nun klopodas trovi kunredaktoron en lando militanta kontraŭ Germanujo.

Alineo 2. — S-o Hevesi estas prava, kio koncerne la perfektajn kaj seriozajn Esperantistojn. Tamen ili ne estas la plimulto sed nur malgranda parto de la Esperantistaro. — Kontraste al la opinio de s-o H. ni konsentas daŭre, ke la ilustraĵoj trovas aplaŭdon. Cetere, ne nur la loko estas kara, sed pli „kara“ estas la kliboj.

Alineo 3. — Eĉ por profesia ĵurnallisto ne estas ĉiam facile atingi intervjuon kun eminentuloj, kiom malpli por neprofesia korespondanto de Esp. gazeto!

Alineo 4. — Oni povas kaj ni ankaŭ intencas organizi tian servon; sed kiel ĝi funkcios, estas alia demando. — La ekzemplo de s-o H. estas escepto.

Alineo 5. — La „infanludo“ ŝajnas al ni sufiĉe malfacila tasko. En Lausanne ET eble povis havi raportanton, en Konstantinopolo supoze ne, kaj neniel en Angoro.



El la urbo de nia Dekkvinia:
Nassauer-Domo. Puto de Virteco apud Lorenz-Preĝejo.

pri pago de akceptindaj honorarioj al kunlaborantoj. Ni nur povas liveri al kunlaborantoj kelkajn senpagajn ekzemplerojn de tiuj numeroj, kiuj enhavas iliajn kunlaboraĵojn, kaj — en kelkaj esceptaj okazoj — repagi la afrankon. Pro tio ni devas provizore limigi la enhavon je

bone ordigi la enhavon, uzi pli multe da malgrandaj literoj kaj pli ol ĝis nun konsideri la per-Esperantan parton. Sed oni devas lasi al ni tempon, almenaŭ kvaronon jaron: en majo aŭ junio ni estos pretaj. Pri la kvalito de la enhavo grandparte decidis la legantoj mem. La

La Scienco de l' Amo.

(De D. Merejkovskij.)
Esperantigis M. Kalina.

Messero Fabricjo, unu el la plej kleraj profesoroj de Bolonja Universitato, okupis la katedron de dialektiko; en ĉi tiu scienco li posedis tiom da lerteco kaj da arta ĉarmo, ke oni lin kutime nomis: la reĝo de silogismoj. Tamen ne nur la dialektiko sed la tuta horizonto de la homaj konoj kiel „trivium“ tiel „quadrivium“ kvazaŭ kuŝis sur la manplato de messero Fabricjo. Sed plej rimarkinde estis, ke la scienculo evidentigis la abismon de sia profunda saĝo ne nur en la gravaj sciencaj problemoj, sed eĉ en la plej etaj aferoj de ĉiutaga vivo.

Foje, rakontas la studentoj, li devis adresi leteron jene: „Padua. Vina placo. Apoteko sub la Luno“, kaj la distrita profesoro ornamis la koverton per sekvanta surskribo: Nella città Antenorea, in sul foro di Bacco, all' aromatoria della dea trifolore, t. e. Urbon de Antenoro, ĉe forumo de Bakho, aromojon de la diino Triforma.

La lingvon de Tullius li parolis tiel majstre kaj ĝin uzis tiel ofte, ke li preskaŭ forgesis la idiomon de sia patrujo, cetere ne ĉagrenis lin la afero, kiun li opiniis tro malsatinda por sia digno, kaj en malbona humoro li eĉ diradis, ke la „Dia Komedio“ de Dante nun, en la jarcento de aŭtentika Cicerono elokventeco taŭgas apenaŭ kiel ĉupokaĵo por la kolbaso; sed kiam li klarigis, kiel oni devas skribi la vorton „consumptum“ — kun p aŭ sen p, tiam antaŭ la mirigita aŭskultanta estis malfarmata tioma trezorejo de la saĝeco, ke eĉ la plej facilanimaj kaj nekleraj homoj sentis timon kaj respektplenan teruron.

Messero Fabricjo estis malaltekreska, malforta kun postsignoj de frua veikado, ĉar lia korpo

estis konsumita de senĉesaj kaj treegaj sciencaj okupoj, sed lia mieno estis ĉiam tre serioza kaj severa, okulesprimo profundpensa, la densaj brovoj — sulkitaj, la paŝmaniero — malrapida kaj majesta. Certe neniu krom li estis kapabla por tiu kun tiom da indeco sian frambkoloran profesoran mantelon subkudritan per lepora felo kaj grandegan ĉapelon, nevole sugestiantan ideon pri bongusta kuko, kiun la maslinoj preparas por infanoj okaze de l' festo de St. Johano Baptisto.

En tiu tempo ĉe Bolonja Universitato studadis eklezian kaj civilan juron du intimegaj amikoj, nobelaj kaj riĉaj junuloj, apartenantaj al estimata familio de Savelli. Unu el ili estis nomata Buĉiolo, la alia — Petro Paolo. Ĉiuj scias, ke la eklezia juro estas malpli ampleksa ol la civila, sekve Buĉiolo, kiu estis studanta la unuan, finis sian kurson pli frue ol Petro Paolo.

Decidinte reveni hejmen, li diris al la kunulo:

„Kara Petro, mi jam ricevis la ateston kaj mi intencas nun reveni hejmlanden.“

Petro respondis:

„Ne forlasu min ĉi tie tute solan, mi vin petas. Atendu nur ĝis la fino de l' nuna vintro. Mi finos la kurson printempe kaj ni povos kune forveturi. Atendante, por ne perdi tempon, vi elektu laŭ kora inklino iun ajn sciencon kaj studu ĝin.“

Buĉiolo konsentis, promesis al la amiko atendi, sin direktis al sia profesoro, messero Fabricjo kaj diris al li:

„Mi decidis atendi je mia kuzo, kaj mi petas vin, majstro, dume konatigi min kun iu ajn bela scienco.“

„Bone“, respondis la majstro, „elektu, kiun vi deziras ekposedi, mi volonte gvidos vian laboron.“

Buĉiolo diris:

„Majstro, se mi esperus akiri la konsenton de via moŝto, mi dezirus studi la sciencan de l' amo.“

Messero Fabricjo, aŭdinte tian peton, sulkigis la brovojn kaj intencis tiel bonege „lavi la kapon“ de la aroganta knabaĉo, ke li estonte neniam havu la dezirojn ŝerci kun profesoroj; sed ekrigardinte Buĉiolon, li rimarkis en lia vizaĝo delikata kaj rozkolora, tiel simplaniman kaj fidoplenan rigardon, tiel modestan kaj respektan ekridon, ke moris sur liaj lipoj la latina insultaĵo jam preta eksalti, li rememoris ion malnovan, aĝraban kaj gajan, rilatantan nek al silogismoj nek al gramatiko de Prisciano kaj Donato; li do ankaŭ ekridetis kaj respondis al sia disĉiplo:

„Bonege! Ne eble estus elektit iun alian sciencan pli kolcidantan kun mia kora inklino. Tial venu sekvontan dimanĉon en la preĝejo de l' pastroj Minoritoj al la malena diservo, kiam kunvenas tien la virinoj el la urbo kaj ĉirkaŭ, ĉu vi ne trovos inter ili iun, kiu al vi plaĉos. Se vi trovos, sekvu ŝin de malproksime ĝis vi ekscios, kie ŝi loĝas, poste revenu al mi. Jen la unua leciono por vi, plenumu ĝin akurate.“

Buĉiolo agis laŭ la indikoj de sia majstro. Li iris en la preĝejo kaj komencis atente trarigardi la vizaĝojn de la virinoj, kies nombro tie estis sufiĉe granda.

Plej plaĉis al li unu sinjorino bela kaj plena de insida kaj subtila ĉarmo. Kiam ŝi eliris el la preĝejo Buĉiolo sekvis ŝin kaj bone observis la domon, en kiu ŝi loĝas. La sinjorino rimarkinte la observadon konkludis, ke la studento havas amindumajn intencojn.

Poste li revenis al sia majstro kaj diris:

„Mi plenumis la unuan lecionon kaj trovis sinjorinon, kiu plaĉas al mi.“

La tuta afero ŝajnis al sinjoro Fabricjo amuzega, kaj li kaŝe mokitis pri la simplanima Buĉiolo kaj la scienco, kiun li estis ellernonta. Tamen kun grava kaj profundpensa aspekto li diris solene:

„Nun estas bezone, ke vi preterpromenu du aŭ tri foje dum la tago antaŭ ŝiaj fenestroj, sed vi konduitu modeste kaj dece. Rigardu ŝin sekrete, por ke neniu atentu pri tio kaj sole la sinjorino povu kompreni, ke vi estas ekaminta ŝin. Poste revenu al mi. Tio estas la dua leciono.“

Buĉiolo adiaŭis la instruiston, venis la straton, kie loĝis la amafino kaj prudente komencis la sin-gardeman promenadon antaŭ la domo, sed tiel, ke ŝi povis rimarki, ke li tion faras ekskluzive pro ŝi. La sinjorino ekvidis lin. Buĉiolo kun afekta ĝentileco salutis ŝin kelke da fojoj. Ĉar ŝi lin resalutis, li konkludis, ke la sinjorino estas favorkora por li. Tuj li revenis kaj komunikis ĉion al la instruisto, kiu aŭskultinte lin, diris:

„Belege! mi estas kontenta je vi. Ĝis nun ĉio okazis plej bone. Nun vi estos devigata dungi unu el la strataj kolportistinoj, kiuj vendas en Bolonjo puntojn, monujojn, rubandojn kaj aliajn modajn komercaĵojn, kaj vi ordonu, ke ŝi komunu al via sinjorino, ke vi estas preta servi al ŝi laŭ ŝia deziro — kaj neniu sur la tero vi amas pli forte ol ŝin kaj de nun vi intencas fariĝi ŝia plej fidela sklavoj. Vi atendu la respondon kaj poste reiru al mi tuj, mi instruos vin, kie agi plue.“

Buĉiolo foriris. Ne perdante tempon li trovis komplezeman, maljunan virinon, treege apertan en tiaspecaj aferoj, kaj diris:

„Vi povas fari al mi grandan servon, mi rekompencos vin tiel, ke vi estos kontenta.“

ĉar tie laŭ nia scio eĉ ne ekzistas Esperantisto. Ni ankaŭ ne kredas, ke profesia jurnalistoj ne-Esperantistaj plezure faros artikolojn senpage.

Alíneo 6. — Vidu poste!

Alíneo 7. — Klarigi la kaŭzojn de milito kaj similaĵoj estas tre delikata tasko, eĉ se oni provus apliki dian objektivecon.

Alíneo 8. — Jen s-o H. aludas la solan seriozan provon krei internacian informservon. Ni faris ne tre kuraĝigajn spertojn per tiu arango, kvankam inter la raportistaro troviĝis eĉ profesiaj jurnalistoj. Kelkajn raportojn („leterojn“) ni devis tri-kvarfoje tralegi, antaŭ ol kompreni ilin, kaj tiam ni ankoraŭ ne scias, ĉu ni *ĝuste* komprenis; fine ni devis kvazaŭ nove ellabori ilin, por ke ankaŭ la legantoj komprenu. — Cetere, antaŭ ol la semajna *Esp.* gazeto povus raporti pri la ajn efektive *grava* okazaĵo, oni povus ĝin legi jam delonge en *ĉiutaga* naciaj jurnaloj. La sola ŝanĝo, kiun ni povos fari por aktualigi ETon, estas pli-grandigi la *per-Esperantan* parton kaj konforme malgrandigi la *pri-Esperantan* parton, t. e. limigi kaj koncizigi ĉiujn artikolojn pritraktantaj *Esp.* temojn kaj enkonduki novajn regulajn rubrikojn „Tra la Mondo“ (mondnovajoj), „Paroloj kaj Dokumentoj“ (gravaĵ por la mondpoliitiko), ktp.

Sed ni bezonas tempon. Ni ripetas: en majo aŭ junio ni estos pretaj. La organizo de internacia informservo kompreneble daŭros ankoraŭ pli longe kaj povos okazi nur iom post iom. Ni volas ankoraŭfoje provi ĝin, malgraŭ niaj malbonaj spertoj, ĉar ankaŭ ni opinias ĝin grava. Eble ni nun sukcesos pli bone.

S-o Hevesi ŝajne tro alte takas la Esperantistaron. Vere *perfekta*j Esperantistoj, t. e. *Esperantistoj*, kiuj perfekte scipovas la lingvon, ekzistas nur en malgranda nombro, kaj „nedirale“ perfektaj Esperantistoj, t. e. Esperantistoj, kiuj staras efektive super nacio, socio, dogmo, partio, estas ankoraŭ pli maloftaj. La plimulto faluze atentis, ke eĉ ne vorteto estu skribata, kiu povus ili ofendeti ilian nacion, socion, konfesion aŭ partion. Publikigis iun artan, iom liberan literaturaron aŭ iun artan sed nudan figuron, tuj krios la moralistoj; aŭ skribu nur la nomon de iu du- aŭ trinacia urbo laŭ la maniero de unu nacio, tuj krios la alinacianoj. Kaj ili estas *Esperantistoj*!

Ni perfektigu ETon, kiom kaj kiam tio estos ebla; ni konsideru la konsilojn, dezirojn kaj kritikojn, kiom ni opinias tion utila; kaj cetere — ni ne parolu, sed agu!

Aktualaj Kongresdandoj.

Nenio eble ilustras la ŝancojn de nia XV-a pli bone, ol la registrinda fakto, ke ĝis mezo de februaro kompletigis jam la dua milo da aliĝintoj — unikaĵo en la historio de niaj kongresoj, kiu esprigas, ke la kalkulo je 5—6-mila kongresanaro ne estos utopio. Efektive ĉiu tago alportas novajn aliĝojn el ĉiuj landoj, kelkaj federacioj anoncis eĉ karavanopon partoprenon, kaj la nepre kontentiga evoluado de la kongresprenaroj pravigas la fidon al plena sukceso. Aliflanke ĝisvenis al LKK lastatempe diversaj sugestoj, proponoj kaj eĉ plendoj, kiuj ja estis jam respondataj de ni private, sed en intereso de nia U. K. estas pritraktindaj ankaŭ publike en nia *Esp.* gazetaro por forigi ĉiujn miskomprenojn kaj unuigi ĉiujn fortojn en fidele kunhelpo al feliĉa prosperado.

Grava dubo, kiu kontraŭstaris jam en Helsinko la elekton de Nürnberg, estis ĉu malafabla sinteno de la sfinksa bavara registaro ne povus malhelpi la alvenon de kelkaj miloj da fremduloj. La maltrankviliĝo pliiĝis, kiam tiu ĉi registaro, pro progresanta malhavo de nutraĵoj, decidis lastatime denovajn envojaĝajn malfaciligojn, kiuj trovis multopan komenton eksterlande. Speciale la angla kaj franca gazetaroj raportadis pri tiuj okazoj, komparante pli malpli irafe la bavian registaron al histriko, kiu ja konate ankaŭ detenas ĉiujn nekonvenulojn per akraj bariloj. Kiel ni jam konstatis en nia dua cirkulero, tiuj ĝeneralaj malfaciligoj ne tuŝas la partoprenantojn je U. K. Laŭ oficiala deklaro de la Nürnberga urbkonsilantaro, kiu estas laŭ bavara leĝo unusole kompetenta en tiu ĉi grava demando, ĉiu kongresano havos la envojaĝpermeson. Rilate al la restado oni decidis komence, ke ĉiuj kongresanoj el la sama lando pagu kune

nur la unuopan kongreskotizon por la tuta kongressemaĵo. Sed montriĝis poste, ke multaj samideanoj intencas restadi pli longtempe en Bavario, vizitante ankaŭ aliajn vidindajn urbojn ekz. München, aŭ la beleĝan bavian montegaron. Por indulgi ĉi tiujn gastojn je novaj pezaj impostoj, la LKK interrilatis denove kun la kompetentaj instancoj kaj atingis arangon, laŭ kiu la kongresanoj pagu por trisemajna restado en tuta Bavario proksimume nur la kvaronon de la oficiala tarifo, t. e. angloj 5 ŝilingojn, hispanoj 6 pesetojn, svisoj 6 frankojn ktp. Cetere la lasta vorto ne estas ankoraŭ parolita, same kiel ankaŭ de la germanrespublika registaro favoraĵoj pri pasvizo k. a. nepre estas atendeblaj. Pri tio ni raportos post definitiva decido.

Multan maltrankviliĝon estigis dualinie, speciale en bonvalutaj landoj, la relative altaj kaj ŝajne malproportiaj kongresaj kotizoj. Bone sciante, ke financaferoj ĉiam lomete nervozigas, ni ne reriproĉu tiujn, kiuj pli malpli laŭte plendis kaj atakis la LKK-on, opiniante ĝin ĉefkulpulo en tiu ĉi delikata afero. Tamen ni permesas al ni, por klarigi nian situacion, kelkajn principajn konsistojn. Unue la kotizoj ne estas fiksitaj ekskluzive de LKK, sed laŭ regularo kaj interkonsento kun KKK, kiuj ambaŭ instancoj plej detale, zorgeme kaj konsciencie ekzamenis la malfacilan demandon kaj decidis fine laŭ bazo de la XIV-a kaj mezseptembra stato de la diverslandaj valutoj. La Helsinkia tabelo estis ja trovinta niascie ĝeneralan konsenton, kaj la ĉiulandaj ekonomiaj cirkonstancoj certe ne pliboniĝis, sed plikarigiĝis interdume. Kaj efektive, komence neniu protestis kontraŭ la arango, kaj ĉio ŝajnis en bona ordo. Nur de post la senekzempla senvalorigo de la germana marko oni ekriproĉis pli malpli akre la nunan malproportion kaj sugestis malpligon de la bonvalutaj kotizoj. Ĉu tiuj ĉi samideanoj pripensis la neeviteblajn konsekvencojn de siaj postuloj? Certe ne! Alie ili devis ekkoni, ke tia nova arango estigus ĝeneralan konfuzon, multajn kostojn kaj veran fonton de ĉiamaj plendoj. Krom tio la kongresa kaso, ĝuste pro la senvalorigo de la germana marko des pli necese bezonas la kompensigajn eksterlandajn kotizojn por kontpagi la fakturojn por starigo de kongresa oficejo, propagando, paperoj, presaj, poŝtelspezoj, kongressignoj kaj aliaj necesaj. Sed kial — oni konkludis — ĵus ni bonvalutuloj estu la viktimoj, dum la aliaj pagas veran bagatelon? Kontraŭ tio ni atentigas, ke laŭ septembra valuto 200 gmk. ne estis bagatelo, sed sufiĉe alta sumo, des pli ke la salajroj tute ne plialtiĝis laŭ la ĝenerala plikariĝo. Cetere de post la 1. januaro la LKK kvindobligis la komencan kotizon por malbonvalutuloj, rezervante al si la rajton pri plua plialtigo laŭ progresanta senvalorigo de la germana marko. Trie: la feliĉaj bonvalutuloj ne forgesu, ke ilia ŝajna plialtiĝo nepre kompensigis per la supre menciitaj konsiderindaj favoraĵoj kaj la malmultekosta restado en la ĉiiera kongreslando, dum la malbonvalutaj samideanoj partoprenos la kongreson sub treege malpli favoraj cirkonstancoj. Konsiderante ĉiujn tiujn argumentojn la LKK je sia sincera bedaŭro principe devas malakcepti ĉiujn petojn kaj sugestojn pri individua aŭ ĝenerala malaltiĝo de kelklandaj kotizoj, bone rememorante, ke la tuta budĝeta konstruaĵo ŝanceliĝus, se oni elprenus eĉ nur unu brikon. Ni ĉesigis ankaŭ la tradician rabaton por samfamilianoj; kiu familio povas fari 12—20-tagan vojaĝon, tiu povas pagi, laŭ ni, ankaŭ la regulan kotizon. Samkaŭze ni rifuzis la ekperimenton de kelkaj eksterlandanoj, transsendi la kotizon per germanaj bankbiletoj, pagante eĉ laŭ tabelo por malbonvalutuloj. La LKK konfidas, ke la kongresanoj bone komprenas, se ĝi konsekvence firmtenas la kotizan tabelon. Ĉiu helpu laŭ sia povo, kaj same kiel la LKK tute malegoiste laboras tage kaj

nokte por la komuna afero, tiel vi aliaj samideanoj bonvolu meti ĝoje kaj volonte kaj malheziteme vian obolon sur la altaron de Esperantujo. Nur tiamaniere ni evitos zorgigan kongresan deficiton kaj certigos al nia XV-a kiel eble plej brilan daŭrigon.

Sed ĉu ne estas preferinde plisimpligi la multekostajn festarangojn kaj pli seriozigi samtempe la kongreson, akcentante pli multe la laborprogramon? Kontraŭ tio ni permesas al ni atentigi, ke ĉiuj grandaj kongresoj ŝatas brilan festan kadron. La okuloj de la mondo, kiuj kuŝos sur nia XV-a, juĝos, ne sciante sekvi niajn labor- kaj fakkunsidojn, unualinie laŭ eksterajoj. Ju pli impresiga la tutarangoj, des pli granda la propaganda efiko. Krom tio post serioza laborado la samideanaro rajtos amuziĝi, kaj multaj feruloj serĉante distraĵojn preferas manifesti amuziĝante.

Pro tio ni ankaŭ ne povas konsenti la proponon de D-ro Stromboli, kiu proponis malkoncentrigon de niaj universala kongresoj. Ĉia apartigo de fakkongresoj estus bedaŭrinda malpligo de U. K., kiu perdis aliakeze ĉian sciencan kaj praktikan valoron kaj restus fine nura festaĵo. Ankaŭ praktikke la propono ŝajnas al ni ne bone efektivebla, ĉar la kongresanoj devus vojaĝi de lando al lando, de urbo al urbo, kiu kaŭzus nuntempe multe pli da elspezoj ol la partopreno en unu granda kongreso, kiu unuigas la saminteresulojn sur ĉiuj ajn kampoj. La ĝusta postulo pri pli fruktodona estigo de niaj fakkongresoj estas pli bone realigebla per zorgema preparado de la tagordo, per elekto de taŭgaj referento kaj kunreferento, per eksigo de nuraj scivolemuloj, per antaŭa korespondado de la partoprenantoj. Tiu-sence klopodos la LKK kaj esperas kontentigi samgrade la scienculojn, praktikulojn kaj festemulojn.

Multe pli zorgigas la LKK-on la nuntempa germanlanda kaj tutmonda politika situacio, kiu malfaciligas konsiderinde la propagandon kaj palpeble hezigitas la aliĝojn el kelkaj landoj. Sed fine U. K. ja ne estas politika sed kultura afero, kaj estu nia celado akcenti kaj substreki ĉiuokaze la nepolitikan karakteron de nia manifestacio. Esperu ni, ke la minacanta nubaro estos malaperinta ĝis la kongreso, tiel ke nubris ridetanta ĉielo sur nian XV-an. Kio ajn okazos, la LKK staros firme ĉe la direktilo kaj klopodos per ĉiuj fortoj direkti feliĉe la kongresadon en la certan havenon.

Zorgigaj infanoj, laŭ proverbo, faras fine al siaj gepatroj la plej multan ĝojon. Do, ni ne plendu tro laŭte pri okazaj malhelpaĵoj, ĉagrenoj kaj zorgoj! Eble ankaŭ ili kontribuos, post feliĉe superigita krizo, plikarigi al ni ĉiuj la XV-an.

D-ro Richard Ledermann,
Prezidanto de LKK.

Komerca Konferenco en Venezia.

2.—4. aprilo 1923.

La preparado por la konferenco bone prosperas. La Venezia Komerca Ĉambro konfirmis sian patronecon kaj la Itala Komerca Ĉambro por Svislando akceptis kunvoki la konferencan kaj inviti oficiale interesatajn organizaĵojn, same kiel la Instituto J. J. Rousseau faris lastan jaron por la Lerneja Konferenco en Genevo.

La programo de la konferenco estos baldaŭ definitiva fiksata. La laborkunsidoj sendube malfermigos lundon, 2. aprilo, matene, kaj daŭros mardon kaj merkredon. Dimanĉon Paskan alvenos matene la brita delegitaro. Aliaj jam alvenos pli frue por viziti la urbon. Sabaton, 31. marto, kunvenos kredeble la grupaj delegitoj de la Itala Federacio.

intencojn, sed kio koncernas min, ne esperu plu, sinjoro, ke mi reiros al ŝi, kaj mi ne konsilus al vi tion fari.”

Buĉiolo tre afliktiĝis, senprokraste venis al sia instruisto kaj rakontis, kio okazis.

Messero Fabricio konsolis lin kaj diris:

„Trankviliĝu, Buĉiolo. Neniu arbo falas post la unua hako. Promenu ankoraŭ unu fojon sub ŝiaj fenestroj kaj ni vidos, kian mienon ŝi faros. Poste revenu al mi.”

Buĉiolo ne pripensante longe sin direktis al la domo de sia amatino. Apenaŭ ŝi lin rimarkis, tuj ŝi alvokis la servistinojn kaj ordonis:

„Ulivino, iru en la straton kaj diru je mia nomo al tiu junulo, ke li nepre venu al mi hodiaŭ vespere.”

Ulivino alproksimiĝis al la junulo kaj diris: „Messere, sinjorino Giovanino tre petas vin, ke vi bonvolu veni al ŝi hodiaŭ vespere, ĉar ŝi deziras paroli kun vi.”

Buĉiolo ne scias kion pensi, tamen li respondis: „Bone. Vi anoncu al via mastro, ke mi venos plezure.”

Poste li alkuris plej rapide al Fabricio. La profesoro ankaŭ miris kaj demandis:

„Ĉe kiu strato loĝas via sinjorino?”

„Ĉe la strato Maskarella.”

„Kaj kiel estas nomata la servistino?”

„Mi ne scias. Ŝi estas alta, maldika, nigra kaj lamas je la maldekstra kruro.”

„Mi ĵuras por Herkuleso, ke tio estas Ulivino,” murmuretis en si mem la profesoro, ruĝiĝante kiel kankro.

„Kion vi volis diri, majstro?” demandis Buĉiolo.

Al messero Fabricio ŝajnis, ke la planko forkuras de sub liaj piedoj kaj la vizaĝo de Buĉi-

La brita delegitaro espereble entenos tri-dekon da reprezentantoj el diversaj komercaj kaj profesiaj organizaĵoj. La B. E. A. decidis subteni la konferencan oficiale kaj s-o C. E. Edmonds, Esperanto, 17 Hart St. London WC, centrigas la tutan organizon de la brita karavano. (Revenbileto karavana London—Venezia—London II-a klaso: £ 8).

La franca delegitaro anoncis pli multnombra ol en Genevo. En Parizo s-oj Archdeacon, Delanoue kaj Agourtime, Esperanto, 51 rue de Clichy, centrigas la informojn. En Sudorienta Francio, kun helpo de s-oj Gabert kaj Cherblanc same faras s-o L. Poncet, Esperanto, 30 rue Ferrandière, Lyon.

El ceteraj landoj venis ĝoligaj aliĝoj, interalie de la grava transporta firma germana Karl Lassen, de komercaj ĉambroj francaj, anglaj, svisaj, italiaj, de Folro en Basel, Barcelona, Leipzig, Praha, Padova, Milano, de Supera Komerca Alternejo en Genova, de ministrejoj aŭ registaraj delegacioj persa, ĉeĥa, germana, de Franca Komerca Ĉambro en Londono, ktp.

La Itala Federacio dissendis cirkuleron kaj organizis monlekton por organizi sian delegitaron. Ĝia prezidanto, s-o Kavaliro Vaona, 5 Via S. Egidio, Verona, ĵus vizitis Venezion por starigi tie lokan akceptan komitaton.

Ekspozicio de Esperantaj reklamiloj, prospektoj, afiŝoj, katalogoj aŭ gvidlibroj, ĉu komercaj, ĉu turistaj, estos organizata en Venezia. Oni sendu la dokumentojn al s-o Giovanni Bonini, S. Angelo, calle Avvocati, 3901 A, Venezia, aŭ alportu ilin mem dum la antaŭpaska semajno anoncante antaŭe por rezervi lokon.

Hotelo Wagner, sur insulo Lido, konfirmas definitive la promesitan prezon de loĝado kaj manĝado por 30 liroj po tage. Sed, ĉar la nombro de ĉambroj estas limigata, tiu prezo estos certigata nur al la konferencanoj sian anoncintaj antaŭ la 5. marto 1923 al UEA-oficejo en Genève, 12 Bd. du Théâtre.

(Laŭ „Esperanto“ de UEA.)

Firmoj, folioj, organizaĵoj Esperantistaj aŭ uzantaj Esperanton, kiuj deziras konatiĝi, sendu prospektojn, flugfoliojn, specimenojn ktp. por elmontri aŭ disdoni ĉe la konferenco. Sendajojn oni adresu al la rektigito s-o Giovanni Bonini, Calle Avvocati 3901 A, Venezia XXI, kun informo, ĉu por elmontri ĉu por (senpage) disdoni.

Presoficejo de Itala Esp. Fed.

Flugfolioeto.

Ni ne nur parolu, skribu kaj kantu, sed ankaŭ ni ridu Esperante: Mi volas diri, ke ni Esperantistoj estu pli naturaj, pli homaj, pli serenanimaj, pli gajaj, pli ridemaj! „Kion signifas ĉiu seriozeco?” demandas mire la filozofo kaj respondas: „Mi kredas nur je diĝo,” kiuj scias ridi.” Do tiel grava li opinias la ridadon, ke eĉ la ĉielanoj li ne povas imagi ne ridantaj. Kaj ni Esperantistoj? Ĉu ni ne havas motivojn ridi el gaja koro? Ĉu ni ne havas por la homaro „Bonan Scigon”, Evangelion? Do, ni donu ĝin al niaj proksimuloj ridetante. Bone mi scias, ke la seriozeco de la laboro facile influas nian temperamenton farante nin mem seriozaj. Ni rigardu ekzemple la homojn de la senĉesa laboro, la industriulojn kaj akiremuojn. En ja privataj aferoj ili estas plej ofte enulge seriozaj kaj tial malallogaj. Ni Esperantistoj zorgu, ke nin ne kaptu la sama eraro. Ne farante sagacajn paroladojn, incitantane senutilajn disputojn kaj montrante la mienon de tro severa instruisto ni akros la mondon, sed gaje ridetante, prezentante nian lingvon kiel aferon kompreneblan per si mem. Kiu ne volas aŭskulti nian Evangelion, tiun ni preteriru mistere ridetante, sen kolero, sen protesto. La junularo kaj ĉiu, kiu ankoraŭ inklina al serena ĝojo kaj flori-

olo duobliĝas. Sentante mankon de fortoj por elteni la lastan baton de l' sorto kaj timante, ke Buĉiolo elparolos la nomon de Giovanino, ĉar tiu estis la nomo de lia propra edzino, li ne kuraĝis demandi plu. Dum la daŭro de l' vintraj monatoj la profesoro kuitime pasigis la noktojn en la universitata konstruaĵo, por havi eblon daŭrigi la kursajn laborojn kun studentoj eĉ dum la noktaj horoj; Giovanino restadis do hejme sola kun sia servistino.

„Ĉu vi iros rendezuon, Buĉiolo?”

„Kompreneble.”

„Antaŭ ol iri, vizitu min, mi petas.”

Buĉiolo respondis: „Bone!” kaj foriris. La majstro konkludis laŭ liaj vortoj kaj aspekto, ke li nenion suspektas.

„Mi ne volas,” ekpensis messero Fabricio, „ke li studu ĉi tiun sciencan je mia konto.”

Vespere alvenis Buĉiolo.

„Majstro, estas tempo iri rendezuon.”

„Iru do kaj estu singardema.”

„Ho, vi povas fidi al mi.”

Sur la brusto li havis dikan kirason, akran glavon sub la brako kaj longan panardon ĉe la flanko. Kiam li foriris, sinjoro Fabricio sekvis lin sekrete, por ke li tion ne rimarku. Buĉiolo alproksimiĝis al la pordo de sia sinjorino, kaj apenaŭ li komencis frapi, ŝi malfervis kaj enlasis lin. La propraj okuloj de la profesoro konvinkis lin, ke la amatino de Buĉiolo estas sinjorino Giovanino, lia edzino, kaj li neprikribeble furioziĝis.

„Ho, Minervo, nun ekzistas neniu dubo, ke li studas je mia konto!”

(Finio)

anta espero, kuros al ni renkonte. Kaj eĉ niajn kontraŭulojn ni venkos ridetante. „Ridado mortigas“ — diras la filozofo kaj estas denove prava. Ne atakante ni konvinkas kaj venkas, sed mistere ridetante, kurante de sukceso al sukceso.

Ankaŭ en nia literaturo respeguliĝu ĉi tiu ideo. Kompreneble ni bezonas krom tio seriozajn; sed nuntempe mi pli ŝatas gajaĵojn, kiuj levas la koron kaj nin deflankigas de la ĉiutagaj impresoj sen tio sufiĉe korprenigaj. La malbonhumoron ni venku ridante.

Fine, se foje nin kaptas duboj aŭ pesimistaj pensoj pri nia afero: ni ridu! Malfavoraj cirkonstancoj forpasos kaj restos la granda, ne ŝanĝebla ideo, je eterne valora. Ni suprenkuru la lastajn ŝtupojn al nia supro ridetante pro certeco.

Z.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Ĉeĥoslovakujo.

En Klado okazas du kursoj (ĉeĥlingva kaj germanlingva) gvidataj de s-o Kreibich kaj f-ino Vičková. Klubejo nun en restoracio „u Kreibicha“ Palackýř. 1793. Kunvenoj lunde 20. h.

Italujo.

En Torino nova kurso por fervojistoj, gvidata de s-o Ramolfo, komencis en la Centra Stacidomo de Torino P. N. Trapasantaj samideanoj bonvolu viziti la lernejon, kiu estas malfermita lunde kaj ĵaŭde de la 18-a ĝis la 19-a.

En Genova la movado estas kontentiga dank' al la klopodo de la Laborista Esp. Grupo. La grupo invitis la lokajn komercajn ĉambrojn partopreni la konferencon en Venezia kaj disdonis al aŭtoritatoj kaj bibliotekoj la raporton de la sekretario de la L. d. N pri Esp.

Samideanoj trapasantaj bonvolu viziti la grupkunvenojn ĉiulunde kaj -ĵaŭde de la 20,30-a ĝis la 22-a en la sidejo S. Luca 4/2. Blinda samideano, s-o Caroli Sabatino, anstataŭanta s-on A. R. Tancredi, estas elektita konsulo por la itala blindula Esperantistaro. „Devoj de la homo“ estas ankoraŭ havebla ĉe s-o Ettore Managlia, sekr. de la nomita grupo, cassela postale 922, Genova (Ital.).

Japanujo.

La 15. dec. okazis la naskiĝtagfestoj de la majstro fondiĝis en nia urbo Nagoja „Federacio de Nagoja Esperanta Studentaro“ (F. N. E. S.), kiu estas organizita de studentoj de la OkaNacia Kolegio, Medicina Kolegio, Teknika Kolegio, Komerca Kolegio kaj Cu Kjo knabina liceo. Nun jam kvar federacioj estas organizitaj en Japanujo, t. e. en Tokio, Kioto, Sendai kaj Nagoja. La celo de F. N. E. S. estas kunligo kun la studentaro de la tuta mondo, propagando inter studentoj, prilaktado de studentaj asocioj demandoj kaj interŝanĝo de studentoj.

Yoshi H. Ishiguro,
prez. de F. N. E. S. en Nagoja, P. O.
Box 46.

Rumanujo.

En București la 31. jan. estis fondata Esperantista Grupo „Bukurești“. Inter la anoj troviĝas: Gr. Trancu-Iasi, estinta ministro de laboro, univ. prof. Nichifor, ĝen. inspektoro ĉe la ministrejo de l' Publ. instr., kaptiano-kuracisto D-ro Iosif, advokatoj Negreanu kaj Tedescu, kuracistoj D-ro Kimil, D-ro Mendelsohn, D-ro Fischer-Galati kaj D-ro Caracota, ĝen. direktoro Ph. Hart, pastro P. Provincianu kaj aliaj. La gvidantaro konsistas el s-oj Henriko Fischer L. K., I. Giuglea kaj D-ro F. Iosif. Laŭ punkto de la voĉdonita statuto ĉiu aon senpage ricevas de la grupo la gazeton ET kaj fariĝas membro de UEA kontraŭ la enpagita kotizo. — La grupanoj kunvenas ĉiun merkredon vespere en la Restoracio Rumano-Itala (Str. Campineanu 18). Gastoj bonvenantaj. — Adreso de la grupo: București, Alea Suter 19. Telef. 36/40. Trapasantaj samideanoj estas petataj viziti.

— La grava „Internacia Kontoro de Anoncado kaj Informado“, Calea Victoriei 48 (Cinema Select) instalas Esp.-oficejon por informado kaj vendo de Esp.-aĵoj. La kontoro estas en la centro de la urbo.

— Esp.-Centro Rumana elektis s-on Julio Negulescu Esp.-inspektoro migrantu. Lia ofico estas viziti la samideanojn kaj grupojn de la provinco, organizi la movadon kaj helpi la samideanaron en la propagando.

En Cluj la Esp.-ista Klubo aranĝas ĉiunonate „Intiman Vesperon“ kun programo literatura kaj instrua. La 3-a Int. Vesp. okazis en la helmo de afablaj ges-oj Jánosy. La arivaloran programon prezentis s-oj Engelmann, ekskenatano V. Arano (per propre verkita *odo distihona*, unuarange deklamita), Löcsey kaj T. Morariu („onin ridiĝis“ laŭ s-o O. Rieck).

S-o F. Hügel, la senlaca progagandisto el Timișoara, faris viziton ĉe la samideanaro en Cluj. En kunveno li raportis pri la preparoj de la III-a Rum. Esp. Kongr. okazonta en Timișoara kaj pri la tiea movado.

En Arad mortis la 15. febr. f-ino Maria Bignio, videlo de UEA kaj prezidantino de la tiea Esp. grupo. Ĉe la enterigo de la alte ŝatita samideanino, de multaj faroj fidela, senlaca kaj merito-riĉa propagandistino, parolis s-o prof. Orlov-Ferenczy. La samideanaron de Temișoara reprezentis f-ino R. Wagner. Pri la mortintino dankeme kaj ame memoras la Esperantistaro de la landoj rumana kaj hungara.

En Elisabetopol komencis kurso gvidata de s-o Eugeno Szűcs, del. de UEA.

En Spantú-Gheorghe (Sepsiszentgyörgy) komencis kurso por 30 lernantoj de Kolegio Székely-Mikó, gvidata de s-o Jozefo Bács.

Francujo.

La franca komerca ĉambro en London delegis al Venezia sian eksprez., s-on Guerritte, konsilanton de ekstera komerco.

En St. Maur la 29. jan. antaŭ 200 ĉeestantoj s-o Eyquem honora konsilanto de Paris'a apelacia kortumo faris paroladon.

Hispanujo.

En Valencia okazos 17.—20. majo la I-a Kongreso de Iberiaj Esperantistoj, aronĝota de Valencia Esp. Federacio, prez. Luis Jordana de Pozas, sekr. Andrés Pino. La Federacio dissendas aliĝilojn kaj petas interesulojn sin turni al la Kongresa oficejo: str. Mor 23, Valencia.

Svisujo. Esperanto ĉe la blinduloj.

Post unujara korespondado kaj persona klopodo nia agema samideano, s-o Jules Perlet el Bern la 18. februaro 1923, paroladis al 60 blinduloj de Spiez pri Esperanto kaj ĝia uzebleco por la blinduloj. Liaj klarigoj tre interesaj plene konvinkis la blindulojn, ke Esperanto estas por ili la sola kaj plej bona Internacia ligilo.

Internacia Rejna karavano.

En ET 108 ni publikigis la unuan komunikon pri la Internacia Rejna Karavano (Ireko) de Köln kaj Koblenz al Nürnberg. Bedaŭrinde ĝis nun la unua kunfido de Revelo kaj la Koblenz'a grupo ne jam povis efektiviĝi pro la konata nuna stato en la Reinprovinco. Tamen la Ireko certe okazos, kaj jam nun ni invitas la alilandajn gesamideanojn decidiĝi por la partopreno. En sekvonta numero de ET ni publikigos la detalajn.

Revelo
Esp. grupo Koblenz.

La plej fama hungara dramo en Esperanto.

La gazetoj Pester Lloyd kaj Magyarország de 28. jan. raportas, ke la Esperanto-Instituto preparas Esperantan eldonon de la plej grava hungara drama verko: „La tragedio de l' homo“ de Eneriko Madach, kies verkisto naskiĝis antaŭ cent jaroj. Parto de tiu granda en multajn lingvojn tradukita verko jam aperis antaŭ la milito en „La verda standardo“. La eldonon preparas D-ro Kalocsay, kaj ĝi estos grava pliriĝo de nia literaturo.

(Ripetita, ĉar sensenciga eraro en n-o 125.)

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis: 241. Paul Glöckner, Freiberg 300 gmk.

Scienco.

Röntgen †

Nekrologo de sekreta konsilisto Prof. D-ro W. Wien, München.

La 10-an de februaro la telegrafo scigis la tutan mondon, ke Wilhelm Conrad Röntgen, unu el la plej gravaj eltrovintoj de la moderna historio, mortis je la naŭa matene post mallonga malsano. Ankaŭ jen estus ne malkonvene ekhaltigi ĉiujn movilarojn kelkajn minutojn por esprimi per tio, ke ne mankas ĝenerala kompreno por la signifo de la homo por la homaro. La eltrovo de Röntgen, kiel apenaŭ alia, tuj montris al ĉiuj homoj, al sciencaj kaj al nesciencaj, kion signifas la observado de novaĵ procezoj en la naturo kaj kiel ĝi povas pliigi la posedon de la homaro. Nur malmultaj eltrovoj estas kompareblaj kun ĝi rilate al senpera signifo. El la historio de la novaĵa scienco estas menciindaj la eltrovoj de la galvinismo kaj de la elektromagnetismo kiuj ambaŭ ankaŭ forte influis la evoluon de la scienco. La komparo de tiuj kun la eltrovo de la Röntgen'aj radioj havas specialan intereson, ĉar oni povas ekkoni per tiuj ekzemploj, kiam maniere kun efikas la hazardo ĉe la diversaj eltrovoj. Goethe prave diras, ke por la eltrovo estas necesega feliĉo, kaj per tio estas elparolite, ke vera eltrovo sen hazardo ne estas ebla. Ekzistas certe eltrovoj teorie faritaj, antaŭdiroj konsiderotaj kiel specialaj sciencaj triumfoj, ĉe kiuj la hazardo en la ĝenerala senco ne kunefikas. Sed ankaŭ ĉe ili la popo'a konscio ofte supozas la kunefikon de hazardo karakterizotan priokologia, kiel ekzemple la legendo raportas, ke Newton estas kondukita al la eltrovo de la leĝo de la ĝenerala gravitado per pomo falanta de arbo. Neniu povas detale dissolvi la spiritalajn okazintaĵojn, kiuj fine kondukis al granda eltrovo, sed la diferenco inter la faroj de Galvani kaj Oersted unuflanke, de Röntgen aliflanke tuj devas evidentiĝi.

Galvani ne sciis perfektigi sian eltrovon sur scienc'a fundo kaj devis lasi la efektive sciencan laboron al Volta, kaj ankaŭ Oersted kontentigis per la observado de la deklino de l' magnet-montrilo ne pluen ĝin sekvanta, tiel ke la leĝoj de elektromagnetismo devis esti trovataj per aliaj esplorantoj mallongan tempon post li. Kontraŭe al tio Röntgen ne nur tuj pluen sekvis ekzaktege, kiel estis krakteriza por li, la observadon de la eklumado de grajneto de barloplatenclanido, la ĥemia kombino aplikata por Röntgen'aj ŝiruuloj, sed eĉ esploris plej zorgeme kaj admirinde akrevide la procedojn ekkonitajn novaj tiel perfekte en ĝiaj ecoj, ke pasis unu kaj duono jardekoj, antaŭ ol nova granda paŝo ebligis en ĉi tiu fako.

La procedoj en la Röntgen'a tubo, la radioj katodaj kaj kanajaj, estis konataj jam antaŭ la eltrovo de Röntgen, kaj precipe Lenard estis esplorinta la unuajn plej detale kaj jam estis eltrovinta la Röntgen'ajn radiojn. Sed ĉi tiuj fontoj fluantaj en la fizika fako ankoraŭ malmulte konata nur post la eltrovo de Röntgen estas kunligitaj al foriega rivero, kiu nun portas per siaj fortaj ondoj grandan parton de la fiziko. Senpere post la eltrovo de Röntgen kaj iniciatite plejmulte de li la radioaktivaj substancoj estas eltrovitaj, la ecoj de radioj katodaj kaj kanajaj estas esploritaj, eltrovo sekvigis eltrovon, novaj teorioj ekestis kaj kaŭzis novajn esplorojn kaj tiel estiĝis la kon-

struajo de la atomesplorado hodiaŭ forte larĝiĝinta.

Post kiam per la eltrovo de Laue estis konstatite, ke la Röntgen'aj radioj laŭ sia esenco estas onda procedo kiel lumo, sed kun ondo-longeco dekmiloble pli mallonga, ili havigis novan ne supozitan helpon por la atomesplorado. Helpe de ili unue estas konstatita la geometria modelo de la atomo de diamanto, kiu havas alian figuron ol grafito ĥemie identa, kaj sur ĉi tiu vojo oni povis pli kaj pli enpenetri en la mondon de la malgrandaj, de atomoj. Krome oni lernis disparti per la atomoj en kristalo krade aranĝitaj la Röntgen'ajn radiojn en spektrom simile, kiel estis eble ĉe lumo per strekoj artefaritaj, gratitaj en poluritajn ebenajojn. Tiamaniere akiritaj spektroj de la Röntgen'aj radioj permesis rekonkludi pri la atomoj.

Tial la Röntgen'aj radioj irigis la fizikistojn sur vojoj tute novaj kaj antaŭe ne konataj, sed aliflanke la aplikado en la medicino ne estis pli malgrava. Fotografante la manostojn Röntgen prezentis al la medicina scienco la plej grandan donacon, kiun iam tiu ricevis de la fiziko. Post la perfektigo kiel helpilo por la diagnozo kaj post la apliko por sanigaj celoj la Röntgen'aj aparatoj povas foresti en neniu malsanulejo, eĉ ne plu ĉe iu kuracisto.

Estas nature, ke tiom granda eltrovo superas ne nur la aliajn fizikajn laborojn de tuta epoko, sed ankaŭ la ceterajn de la eltrovinto mem. Kaj tamen Röntgen estus, eĉ ne eltrovinte siajn radiojn, unu el la plej gravaj fizikistoj de nia tempo. El liaj ceteraj laboroj faritaj en la plej diversaj fizikaj fakoj jen estu menciataj nur kelkuj. Röntgen unue konstatis nerifuteble, ke malseka aero absorbas la radiojn de varmo — fakto grava por la kono de la procedoj en la atmosfero. Antaŭe la observoj ne estis estintaj nekontraŭdireblaj, kaj regis vigla disopinado. Per aparatoj tre simplaj, mem konstruitaj, ĉe kiuj akrevide estis nuligitaj ĉiuj malperpektigaj kaŭzoj ĝenantaj la observojn, li decidis la demandon. Alia grava eltrovo estis tiu de la magnetefiko de vitraĵo rotacianta inter elektre ŝarĝitaj metalplatoj. Ĝi estis fundamente grava por la teorio de la elektromagnetismo kaj por la relativeca teorio. Mezurojn nesuperite precizajn Röntgen faris por la determinado de la elektro produktita per premo, kaj liaj rezultatoj diferencaj kompare kun aliaj pruviĝis ĝustaj, kio okazis ĉe liaj observoj preskaŭ ĉiam. Cetere Röntgen mezuris la dikecon de koherentaj oleotavoloj sur akvo por determini la grandecon de molekuloj. Diversaj provoj estas faritaj por mezuri la kunpremeblon de fluidaĵoj kaj precipe de akvo kun la celo klarigi la kontraŭnormalaĵon, ke akvo ĉe 4 gradoj estas plej densa. Li konkludis el siaj observoj, ke akvo konsistas el du diversaj specoj de molekuloj, el kiuj unu estas la molekulo de glacio. Al ĉiuj eksperimentaj laboroj de Röntgen estas komune, ke li ilin entreprenis konsiderante altan sciencan vidpunkton.

En la lastaj jaroj la granda esploranto sin okupis per la analizo de la elektra kondukeblo de kristaloj ne kondukantaj. Li trovis la gravan faktan, ke tiuj aĵoj fariĝas kondukantaj elektron, se oni ilin elmetas unue al Röntgen'aj radioj kaj poste al lumradioj, kaj li faris multajn provojn por la preciza konstato de ĉi tiuj procedoj.

Röntgen estis plenigita per profunda amo al la scienco. Destinata por la teknika kariero, li transiris tre baldaŭ sur la kampon de la nura scienco kaj laboris nur por ĝi kaj ĝiaj celoj. Neniam li ekintencis utiligi sian grandan eltrovon teknike aŭ eĉ ekonomie. Sed la fajro de lia entuziasmo por vera sciencia esplorado eĉ per la maljunaĝo neniam estis kvietigita. Li konsis la fizikan literaturon kiel apenaŭ alia kaj observis ĝian plian novan evoluon, partoprenante pasie. Cetere la dezirego al propra esplora laborado estis tiel forta, ke li senĉese okupis sin pri ĝi, kaj malmultajn tagojn antaŭ sia morto li laboris ankoraŭ por la scienco fariĝinta la enhavo de lia vivo.

Ĉiuj traktatoj de Röntgen distingiĝas antaŭ ĉiuj aliaj per sia nepra fidiindeco, per la koncizeco de la priskribado kaj per la ekzakteco de la sin-esprimado. Ili estis la rezultato de la grandaj ecoj de lia karaktero, kies ĉefrajtoj estis veramo, sincereco, memkritikado kaj modesteco. Li ne povis sin kontentigi per senĉesa kontrolado de siaj observoj kaj mezuroj, kaj tiel li fariĝis unu el la plej bonaj klasikuloj de la ekzaktaj sciencoj.

W. C. Röntgen naskiĝis la 27-an de marto 1845 en Lennep ĉe malsupra Rejno kaj pasigis parton de sia junaĝo en Holando. Li studadis en Zürich, kie li promociis 1869. Li estis disĉiplo de la eminenta fizikisto A. Kundt kaj fariĝis ties asistanto unue en Würzburg; poste li transiĝis kun li en la grandiozan fizikan instituton de la nove fondita imperia universitato Strassburg. 1875 li fariĝis profesoro ĉe la agrikultura altlernejo en Hohenheim, 1876 eksterordinara profesoro en Strassburg. De tie li estis alvokita al Giessen, 1888 kiel posteulo de F. Kohlrausch al Würzburg. Ĉi tie sukcesis al li en la aŭtuno 1895 lia pionira eltrovo. 1900 li fariĝis posteulo de Lommel en München, kaj li reiriĝis de la instruadofako en la aŭtuno 1919.

La grandaj personaj ecoj de Röntgen nur al malmultaj konatiĝis. Li ne ŝatis publike eliri, kaj lia granda modesteco lin faris des pli sinretenema, ju pli multe kreskis lia fameco. Kiom ajn li konsciis sian grandan sciencan laboron, kiom ajn li sin defendis kontraŭ klopodoj penantaj malgrandigi lian eltrovon, tamen li neniam malŝatis pli multe ĉarlatanecon kaj fanfaronemon. Li ofte suferis per sia fameco, ĉar li estis unu el tiaj bomoj, kiuj diras kun Goethe:

La faro valoras ĉion, nenion la gloro.

Tradukta D-ro Dr. Francke.

Nepra devo

de ĉiu Esp. propagandisto estas, traduki naclingven kaj presigi en plejble multaj jurnaloj la sekvantan noton verkitan de UEA:

Internacia Konferenco de komercaj kaj turistaj korporacio okazos en Venezia sub la aŭspicioj de la tiea Komerca Ĉambro por diskuti la rezolucion de la Pariza Komerca Ĉambro rekomendanta disvastiĝi la uzadon de Esperanto por plifaciligi komercajn rilatojn internaciajn. Oni prilaktos ankaŭ ĝian uzadon por Sendadna Telefonio. La ĉefaj internaciaj foiroj partoprenos la konferencon. Preskaŭ ĉiuj jam uzas Esperanton.

Filatelio.

Novaj svedaj poŝtmarkoj.

1. Blazono sur helbruna subparto. Enskribo: „Kungapost Sverige Sverige 70 öre.“
2. „Rego Gustav.“ Ruĝa 20 öre.
3. „Rego Gustav.“ Violkolora 15 öre, sen akvosigno, traborita duflanke.
4. La sama traborita kvarflanke.
5. „Rego Gustav.“ Verda 10 öre, traborita duflanke, akvosigno liniaj. (Malgranda eldono.)

Fritiof Ahnfeld, Torakars, Svedujo.

La neŭtraleco de ET

restas neinfluita de iuj politikaj cirkonstancoj. Tio estas memkomprenebla. Sed ni deziras speciale akcenti tion, ĉar iu leganto plendis, ke ni publikigis artikolojn kun aludoj pri la Ruhr-okupado. ET ne estas politika jurnalo, sed simple Esperanta. La ĉefredaktoro klopodis kaj ĉiam klopodas, kiel redaktoro de internacia kaj universala jurnalo stari super naciaj, sociaj, konfesiaj aŭ partiaj disputoj. Se li ne ĉiam tute sukcesas en tio, li multe bedaŭras; sed *erari estas home*, kaj li ja estas nur homo. Cetere, li estas pacifisto kaj pro tio ne multe simpatias kun ĉiaj militistaj entreprenoj; tamen, tio estas lia persona vidpunkto, kaj se iuj naclemegaj legantoj de ET pensas alie, li ne provos konverti ilin. Do, ne estas kaŭzo por plendo. ET estis, estas kaj restos neŭtrala. Jen nia firma deklaro!

Administraciaj notoj.

Por atingi la prezon de proksimume 0.12 avis. flk. po numero por ĉiuj malbonvalutaj landoj, escepte Rusalando (vidu niajn artikolojn en n-oj 190 kaj 198) kaj pro denove okazintaj kurzaĵoj ni fiksis novajn prezojn por la landoj:

Hungara: 60 Kronoj

Jugoslava: 2.50 Dinaroj

Pola: 800 Markoj.

La nova prezo validos komence de 15. aprilo. Abonojn, kiuj alvenos antaŭ tiu dato, ni akceptos ankoraŭ por la ĝianuna prezo.

Por ĉiuj aliaj landoj restas la ĝianunaj prezoj.

Svis- kaj Finnlandanojn

ni atentigas, ke komence de 1. aprilo ni devas ĉesigi en liaj landoj la ponumeran vendadon de ET, ĉar pro la lastatempaj tre grave aliĝintaj elasezoj (ne sole laŭ germana, sed ankaŭ laŭ bona eksterlanda valuto) ni ne povas plu konsenti la altan rabaton postulitan de la profesiaj gazetvendadoj. Cetere, la propagando, kiun ni esperis fari per la publika vendado, en la plej multaj lokoj ne estis tiel efika, kiel ni esperis, ĉar ni apenaŭ konstatas pliiĝon de la aĉetantaro, en kelkaj lokoj ni eĉ konstatas malpliiĝon. Kaj fine, la ekzistado de ET estas pli grava ol la propagando farata per ĝia publika vendado.

La ĝianunaj aĉetantojn ni petas, komence de 1. aprilo abonon ETon rekte ĉe ni aŭ ĉe la abonejo. La kondiĉojn kaj prezojn oni trovu sur la tiolo.

Parolejo.

156. Helpa lingvo.
(Rilatas al 182.)

Oni devus diri „la helpa lingvo“. Oni uzas „helpi“, por kontraŭdiri la ideon, ke Esperantistoj deziras detrui naciajn lingvojn. La artikolo „la“ devus malkaŭzi la alian eraron, sed eble la estona lingvo ne havas la artikolon „la“, en kiu okazo uzo „ilu“. Ĉu oni devas kaŝi, ke Esperanto helpas lerni lingvojn?

(St.-M., London.)

Gazetaro.

Pri la konferenco de Venezia enhavis detalajn notojn la francaj gazetoj „Le Cuir“, febr., „L'Exportateur Français“, 6. 2., „L'Ere Nouvelle“, 8. 2., kaj „La Dépêche Dauphinoise“, 28. 1.

France-Monde, organo de asocio „Probus“ por demokrata reorganizo de Francujo, jan. (Bona art. de s-ano Molasenet.) Adevrul Literar, București, 18. 2. (Art. pri Esp. literaturo, precipe Int. Mondit. de firmo Hirt & Sohn.) Bessarabia, 3. 2. (Art. pri Esp. Ĉe Ligo de Nacioj.) Dreptatea, 2. 2. (Art. pri Esp. Centro Rumana.) Vecer, Zagreb, 12. 2. (Esp. kaj la landa turista kongreso.) Twentisch Dagblad Tubenais, Enschede, 9. 2. (Recenzo pri la Bialystok-numero de ET.) Reichenberger Zeitung, 11. 2. (Peraujo kaj Esp.) Hotel- und Gastgewerbe-Zeitung, Reichenberg, 18. 2. (Longa art. pri la mangokarto en Esp.) Norak Bokbinder-Tidende, febr. (Kun letero en Esp. de H. Aas.)

Leterkesto de ET.

Diversaj germanaj poŝtabonantoj. — Bonvolu turni viajn reklamaciojn nur al via poŝtofficejo. Ni tute ne povas atenti plendojn faritajn ĉe ni.

M. B. en Orléans. — Vi trovis la ĝustan esprimon „Ruhr-komedio“. Ankoraŭ pli ĝuste vi ĝin nomus „tragi-komedio“. Mono el Franclando ĝis nun bone atingis nin. J. en V. — La vidpunktoj, ankaŭ de la Esperantistoj, estas diferencaj. Franca samideano konata kiel pacifisto (s-o D. en B.) opinias la Ruhr-entreprenon laŭrajta kaj ĵusta; alia franca samideano nomas ĝin „komedio“. Vi, pacifisto en neŭtrala lando, proponas en via artikolo bol-koli la francan popolon, dum ĝia registaro aplikas perforton en paca tempo. Ni kiel eldonantoj de internacia neŭtrala jurnalo, ne povas enmiksi nin en tiu afero kaj pro tio ankaŭ ne povas publikigi vian artikolon. — Koncerne la alian artikolon „Dezirata enhavo de ET“ bonvolu legi nian propran artikolon en hodiaŭa numero. — Dankon por kunlaboro!

St.-M. en L. — Dankon pro „Diversaĵoj“!

Dr. Fr. en M. — Multan dankon por artikolo pri Röntgen; vi trovas ĝin en hodiaŭa numero.



Internaciaj Foiroj de FRANKFURT a. M.

Survole al Nürnberg!

Printempa Foiro 15.—21. aprilo 1923.
Autuna Foiro 22.—29. sept. 1923.

Petu detalojn kaj presadojn en Esperanto de

Messamt, (Esperanto-Fako)
Frankfurt a. M., Germanlando.



Oni postulu la
"Victoria"-Eksport-
preziston

en germana-bispana
au germana-angla
lingvoj.

Ĵus aperis:

Privat: Vivo de Zamenhof.

Speciale eldono por mez- kaj malbonvalutaj landoj.

Ŝalom-Aleĥem, Perce: Hebreaj Rakontoj.

Postulu nian lastan prezaron kun
firmaj prezoj laŭ naciaj monunuoj.

Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako,
Leipzig, Salomonstrasse 15, Germanujo.

NEDERLANDA ANONIMA SOCIETO

LUKSA-PANO FABRIKOJ

ANTAŬE HENRIJ CARELS.

50 BUTIKOJ: DEN HAAG, HAARLEM, AMSTER- DAM.	LUNĈEJO CARELS (ĈEFO: H. A. SCHAR- WÄCHTER.)	DEN HAAG, 63 WEIMAR- STRAAT. ONI PARO- LAS ESPER- ANTON.
---	--	---

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO,
51, rue de Cligny, Paris.

**Eldonejo de la
Verkoj de D-ro L. L. Zamenhof**
klujn elu Esperantisto devas legi.

Ĉefaj verkoj aĉeteblaj:

Fundamenta Krestomatio, en entaŭla "Ekzerco"-n
(el la "Fundamento de Esperanto"), "Fabeloj kaj Ra-
kontoj"-n, "Artikoloj pri Esperanto"-n "Poezioj"-n.
Unu dika libro 460-paĝa Franc. Frankoj 8.—
Georgeo Dandini, komedio en tri aktoj de Molière.
Unu libro grandformata 2.—
Hamleto, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare.
Unu libro mezformata 3.—
Ifigenio en Taŭrido, dramo en kvin aktoj de Goethe.
Unu libro grandformata 6.—
Proverbaro Esperanta, laŭ la verko "Frazologio
rusa-pola-franca-germana" de M. F. Zamenhof (1232
proveboj). Unu libro grandformata 8.—
La Rabistoj, dramo en kvin aktoj de Schiller. Unu
libro grandformata 4.—
La Revizoro, komedio en kvin aktoj de N. V. Gogol.
Unu libro grandformata 4.—

Verkoj baldaŭ aperontaj aŭ reaperontaj:
Fabeloj de Andersen. Plena kolekto. Unu libro grand-
formata
Marta, rakonto de Eliza Orzeszko. Unu libro grand-
formata
La Rabeno de Bahara, romano de H. Heine. La
Olimpiano, monologo de Ŝalom Aleĥem. Unu
libro grandformata
Lingvaj Respondoj aperintaj en "La Revuo". Unu
libro grandformata

Oni aldonu al la prezoj, plej por la sendkostoj: 15% +
0,25 fr. en Francujo; 20% + 0,75 fr. en aliaj landoj.



1611. Karsch Wilhelm, Laussa Weix-
dorf
1612. Kunze Gertrud, s-ino, Dresden
1613. Jokisch Johanna, s-ino, Dresden
1614. Hockert Helene, f-ino, Dresden
1615. Hinkel Marie, s-ino, Dresden
1616. Rögner Hans, Führl i/B.
1617. Gibrind Hans, Führl i/B.
1618. Keilhack Georg, Führl i/B.
1619. Mengele Josef, Führl i/B.
1620. Hendrich Karl, Führl i/B.
1621. Gemeinhard Ernst, Nürnberg
1622. Jakob Helene, f-ino, Dresden
1623. Wolff Fritz, Nürnberg
1624. Meier Franz, Nürnberg
1625. Will Georg, Nürnberg
1626. Beilein Adam, Nürnberg
1627. Müller August, Nürnberg
1628. Müller Grete, f-ino, Nürnberg
1629. Kneil Leonhard, Nürnberg
1630. Haberstumpf Georg, Nürnberg
1631. Haberstumpf Paul, Nürnberg
1632. Kohler Ernst, Nürnberg
1633. Keuling Karl, Nürnberg
1634. Rom'oh Felix, Gera
1635. Hofmann Linda, f-ino, Gera
1636. Hofmann Georg, Nürnberg
1637. Schreiber Max, Nürnberg
1638. Rönner Robert, Chemnitz
1639. Rudert Erich, Chemnitz
1640. Bilum Jakob, Nürnberg
1641. Schmidt Paul, Dresden
1642. Lindberg Toivo, Parola
1643. Koivu Hannes, Viipuri
1644. Schermerhorn N. J. C., Nieuwe
Niedorp
1645. Schermerhorn A. G., s-ino, Nieuwe
Niedorp
1646. Reisenauer Emö, Wien
1647. D-ro Schwarz Theodor, Budapest
1648. Bayer Bela, Budapest
1649. Prangenberg Luise, f-ino, New
1650. Steinhil Paul, Leipzig. [wied
1651. Popp Oskar, Mülau
1652. Stelninger Josef, f-ino, Altenstadt
1653. Thamm Anny, f-ino, Wien
1654. Kiss László, Pécs
1655. Klein Margit, f-ino, Pécs
1656. Penzes Geza, Pécs
1657. Redely Imre, Budapest
1658. Fojor-Schulcz Serafine, s-ino,
Deva
1659. Kohn Lujza, s-ino, Budapest
1660. Spitzer Rudolf, Budapest
1661. Harras Marion, Pécs
1662. Tejes György, Pécs
1663. Krausz Josef, Pécs
1664. Gultmann Andor, Pécs
1665. Gezane Somogyi, Pécs
1666. Pechan Dora, f-ino, Pécs
1667. Pechan Anna, f-ino, Pécs
1668. Pechan Corona, f-ino, Pécs
1669. Sieron Aloizio, Pécs
1670. Lederer Sofie, s-ino, Budapest
1671. Luyken Heinrich, London
1672. Luber Julius, Nürnberg
1673. Bernhardt Berta, f-ino, Nürnberg
1674. Stock Willi, Merseburg
1675. Bronold Joseph, Weiden
1676. Schmalz Joseph, Weiden
1677. Meczugski R., Lodz
1678. Gebhardt Lothar, Berlin
1679. Gebhardt Gertrud, s-ino, Berlin
1680. Skleckoova Bosena, s-ino, Hradec
Kralove
1681. Sklencka O., Hradec Kralove
1682. Kiehl Otto, Sageritz
1683. Wecker Mariha, f-ino, Nürnberg
1684. Simon Toni, Magdeburg
1685. Medem Paul, Kaunas
1686. Medem Helene, s-ino, Kaunas
1687. Opulsky Apolinario, Kaunas
1688. Klimas Adolf, Kaunas
1689. Krich Eugen, Stuttgart
1690. Dühring Fritz, Leipzig
1691. Pauly Hedwig, f-ino, Michelstadt
1692. Fecke Karl, Mairitzdorf
1693. Lischke Dora, f-ino, Chemnitz
1694. Fritsch, Augsburg
1695. Bärmann, Augsburg
1696. Bärmann, s-ino, Augsburg
1697. Sewald, s-ino, Augsburg
1698. Meczyński Remigiusz, Lodz
1699. Goldenberg Arkadiusz, Lodz
1700. Goldenberg Irene, f-ino, Lodz
1701. Löfller Elae, f-ino, Stuttgart
1702. Jarocki Nikolai, Miesewitz
1703. Bohn Melanie, f-ino, Reichenbach
1704. Wendt Elae, s-ino, Regensburg
1705. Bischoff Franz, Wien
1706. Leuberg Julius, Aüssig a. E.
1707. Pautermann Ine, f-ino, Rotterdam
1708. Schulze Fritz, Göppersdorf
1709. Kämpfe Max, Burgstätt
1710. Kunze, Freital
1711. Kunze, s-ino, Freital
1712. Roiter Max, Crefeld
1713. Schwarzschild Ludwig, Berlin
1714. Venetianer Rósal, Miskolcz
1715. Nemenyi Ödöf, Miskolcz
1716. Venetianer Sándor, Leipzig
1717. Venetianer Nanci, f-ino, Miskolcz
1718. Ehlers Fritz, Hamburg
1719. D-ro Maruzzi Dušan, Zagreb
1720. D-ro Domac Julij, Zagreb
1721. Roitirc Ivan, Zagreb
1722. Kellek Olga, s-ino, Zagreb
1723. Kellek Dragutin, Zagreb
1724. Stiefanković Dragutin, Zagreb
1725. Manojlović Dragutin, f-ino, Zagreb
1726. Manojlović Kamenko, Zagreb
1727. Eisenstädter Alfred, Zagreb
1728. Eisenstädter Rudolf, Zagreb
1729. Lupi Gino, Milano
1730. Bollermann Robert, Gelsenkirchen
1731. Bollermann Grete, s-ino, Gelsen-
kirchen
1732. Seidel Klara, s-ino, Crimmitschau
1733. Jahn Walter, Lengenfeld
1734. Ebert Georg, Lengenfeld
1735. Buckl Georg, Nürnberg
1736. Hegner Joszi, Nürnberg
1737. Bäuml Marieluise, f-ino, Nbg.
1738. Bäuml Josef, Nürnberg
1739. Bennemann Heinz, Leipzig
1740. Bennemann Paul, Leipzig
1741. Beatus Jakob, Nürnberg
1742. Grünbaum Simon, Nürnberg
1743. Müller Kaspar, Nürnberg
1744. Dietrich Erhard, Nürnberg
1745. Nazarevyc Sofia, s-ino, Stani-
stwow
1746. Ehard Josefa, Nürnberg
1747. Vogel Helene, f-ino, Nürnberg
1748. Pilhofer Heinrich, Nürnberg
1749. Feiner Hans, Siegersdorf
1750. Metzger Hedwig, s-ino, Nürnberg
1751. Dietz Anjo, f-ino, Führl
1752. Lämmel Fridl, f-ino, Nürnberg
1753. Geissenberger Alma, f-ino, Nbg.
1754. Seidel Hans, Roth
1755. Neumüller Karl, Roth
1756. Rheinfels Karl, Roth
1757. Rupp Willy, Roth
1758. Seltz Hans, Roth
1759. Siegel Tobias Detwit
1760. Siegel, s-ino, Deiwit
1761. Acha Isidor, Bilbao
1762. Gracia Juan, Bilbao
1763. Jakobson Theodor, Wien
1764. Staudner Carla, f-ino, Wien
1765. Gähring Paul, Magdeburg
1766. Sołtykewyc Julij, Prag
1767. Jahn Milly, s-ino, Berlin-Tegel
1768. Paape Gertraude, f-ino, Berlin-
Tegel
1769. Paape Margrit, f-ino, Bln.-Tegel
1770. Hochfeld Erwin, Bln.-Tegel
1771. Doering Johanna, f-ino, Bln.-Tegel
1772. Meisgeier Edmund, Leipzig-Reud-
nitz
1773. Blazek Josef, Olomouc
1774. Berger Bertalan, Miskolcz
1775. John Marie, f-ino, Breslau
1776. Schiel Elisabeth, f-ino, Breslau
1777. Schiel Gertrud, f-ino, Breslau
1778. Linke Max, Breslau
1779. D-ro Pinagel Viktor, Aachen
1780. Thieme Selma, s-ino, Laifra Lip-
pomäki
1781. Zemann Felix, Rutschau, Sachsen
1782. König Lajos, Miskolcz
1783. Becker Rudolf, Mittweida
1784. Wolf An'ón, Aschaffenburg
1785. Höfling Philipp, Grossostheim
1786. Jaworek Peter, Aschaffenburg
1787. Pfeiffer Armin, Aschaffenburg
1788. Pfeiffer Karl, Aschaffenburg
1789. Böngers Alfred, Grimma
1790. Cox Henry, Wailington
1791. Kargel Christoph, Nürnberg
1792. Koepl J-ae, Nürnberg
1793. Exner Sophie, s-ino, Nürnberg
1794. Schubert Grete, f-ino, Nürnberg
1795. Schubert Frida, f-ino, Nürnberg
1796. Silberhorn Lore, f-ino, Nürnberg
1797. Franzke Emil, Finsterbergen
1798. Hinrichs Irmgard, f-ino, Berlin-
Westend
1799. Schmiedeborg Johann, Delitzsch
1800. Bunzl Josef, Prag
1801. Hermann Ewald, Bildstock
1802. D-ro Bias Leo, Kramsach
1803. Bias Rose, s-ino, Kramsach
1804. D-ro v. Eickstedt Egon, Freiburg
1805. v. Eickstedt Elvira, s-ino, Freiburg
1806. Wliinhainer Zuleima, f-ino, Sei-
najokai
1807. Hendel Kurt, Riesa a. E.
1808. Zeyss Armin, Reyd
1809. Hahn Erich, Eisenach
1810. Hahn, s-ino, Eisenach
1811. Schmieser Ernst, Hamburg
1812. Arnold Hermann, Hamburg
1813. Hubert Karl, Hamburg
1814. Kupfermink Anka, f-ino, Lodz
1815. Aiseika Lindas, Birzai
1816. Lukosviciute Aiseikene, Birzai
1817. Samuelo Samuil, Cluj
1818. Klajnermann Benjamin, By goszcz
1819. Schobert Marie f-ino Augsburg
1820. Marquardt Käthe, f-ino, Danzig
1821. Demmler Oskar, Erfurt
1822. Kees Hedwig, f-ino, Wien
1823. Burkhardt Walter, Freital
1824. Watzinger Franz, Villach
1825. Watzinger Elae, s-ino, Villach
1826. Menzel Klara, s-ino, Breslau
1827. D-ro H. tztel Wilhelm, B. mberg
1828. Bogatsch Marie, f-ino, Velden i. M.
1829. Ehrhart Paula, f-ino, Velden i. M.
1830. D-ro Bodnan Stefan, Budapest
1831. Atilla Hedwig, s-ino, Helsinki
1832. Atilla Sulo, Helsinki
1833. Schnitzer-Reverey Margret, s-ino,
Hannover
1834. D-ro Siegel Adolf, Unterlauter
1835. Suchan Erhard, Breslau
1836. D-ro Denes Tüllör, Targu-Mures
1837. Kalasz Josef, Targu-Mures
1838. Kalasz Etelka, s-ino, Targu-
Mures
1839. D-ro Berde Maria, s-ino, Leipzig
1840. Steche Elsa, s-ino, Leipzig
1841. Steche Annemarie, f-ino, Leipzig
1842. Geiger Nandor, Budapest
1843. Burkhavot, Freital
1844. Kuhn Emil, Jaromer
1845. Desch Ewald, Homberg
1846. Desch Frieda, s-ino, Homberg
1847. Junker August, Köln
1848. Junker Henny, s-ino, Köln
1849. Goedecke Alwine, f-ino, Essen
1850. Goedecke Marlene, f-ino, Essen
1851. Maier Wilhelm, Dresden
1852. Wittenberg J. G., Neugersdorf
1853. Palapies Otto, Schenkendorf
1854. Pollak Wenzel, Sealfelden
1855. Pollak Anna, s-ino, Sealfelden
1856. Königshofer Alois Sealfelden
1857. Jellenz Karl, Nürnberg
1858. Johannes Maria, s-ino, Düsseldorf
1859. Nedela Jan, Larz
1860. Schäfer Berta, f-ino, Hagen
1861. Lecke Irma, s-ino, Hagen
1862. Kosticki Jan, Warszawa
1863. Schuster Josef, Eger
1864. Karolczyk, Warszawa
1865. Tymirski, Warszawa
1866. Eickhoff Hermann, Schwerte-Ruhr
1867. Amon Peter, Düsseldorf
1868. Marchal Willy, Steinfürchen b. L.
1869. Heberer Alfred, Offenbach a. M.
1870. Schulz Armin, Hirschfelde (Sa)
1871. Goldbaum M., Warszawa
1872. Strenger Walter, Zuffenhausen
1873. Falek Beno, Jaslo
1874. Pemberton Beatrice, f-ino, Acer-
nington
1875. Berry Evelino, f-ino, Haalingden
1876. Stuart Cissie, f-ino, Haalingden
1877. D-ro Rosenstock Stanislaw, Zagreb
1878. Rosenstock Maria, s-ino, Zagreb
1879. D-ro Heinrich Gustav, Zagreb
1880. Heinrich Nuna, s-ino, Zagreb
1881. Novljan Fran, Zagreb
1882. Maruzzi Ljubica, f-ino, Zagreb
1883. Hiac Dragutin, Zagreb
1884. Kramaric Iranjo, Zagreb
1885. Duitkovic Ivan, Zagreb
1886. Dubravcic Josefina, Zagreb
1887. Brünning Wilhelm, Berlin
1888. Hutter Jan, Pleck
1889. Klic Rudolf, Cheb
1890. Bleichschmid Sabine, f-ino, Eger
1891. Kunz Anna, s-ino, Eger
1892. Lenhart Maria, f-ino, Eger
1893. Kari Rosa, f-ino, Elbogen
1894. Capello Anton, Eger
1895. Capello Anna, s-ino, Eger
1896. Capello Regina, f-ino, Eger
1897. Fischer Antonia, f-ino, Eger
1898. Hendrich Sofie, f-ino, Eger
1899. Flecher Hedwig, f-ino, Eger
1900. Kotavala Barbaro, f-ino, Petrograd
1901. May Christian, Schweinfurt
1902. Sopp Max, Schweinfurt
1903. Summe Willy, Schweinfurt
1904. Wachsmuth Bruno, Schweinfurt
1905. Christaller Frida, f-ino, Stuttgart
1906. Immoir Anny, f-ino, Stuttgart
1907. Klein Wilhelm, Möhringen
1908. Klein Mala, s-ino, Möhringen
1909. Weber Anton, Stuttgart
1910. Wittig Hans, Oederan
1911. Grohall Kurt, Charlottenburg
1912. Schlüte August, Berlin
1913. Keim Jakob, Bingen
1914. Parrish Paula, s-ino, Buffalo
1915. Milagres Johannes, Hagen
1916. Mertens Paul, Essen
1917. Blicher Martin, København
1918. Blicher Lulac, s-ino, København
1919. Jensen Johanne, f-ino, København
1920. Gremmler Heinrich, Berlin
1921. Planer Karl, Augsburg
1922. Bolkar Josef, Augsburg
1923. Aubele Johann, Augsburg
1924. Lipphardt Fina, f-ino, Wien
1925. Freimann Hela, f-ino, Kraków
1926. Alig Paul, Halle a. S.
1927. Pfeiffer Walter, Harting (Ruhr)
1928. Müller Alfred, Merseburg
1929. Hofmeister Eugen, Eggmühl
1930. —1937, samideanoj de Eggmühl
1931. Arnold Emma, f-ino, Belfart
1932. Coughough Sarah, f-ino, Belfart
1933. Gibson Tilli, f-ino, Belfart
1934. Zoster Emily, f-ino, Belfart
1935. Hofmann Oskar, Karlsruhe
1936. Pieper Herbert, Karlsruhe
1937. Mald Ernst, Karlsruhe
1938. Maid Emil, Karlsruhe
1939. Gersiner Oskar, Karlsruhe
1940. Braunger Georg, Karlsruhe
1941. Braunger Sophie, s-ino, Karlsruhe
1942. Schmalz Rudolf, Karlsruhe
1943. Glatz Hermann, Durlach
1944. Gülling Eugen, Durlach

Kiu ne jam aliĝis, aliĝu tuj!

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume 2 sinakvaj enprezoj) kostas po 2 enprezoj kaj po 20 vortoj (krom u n u adreso): la prezon de
6 ET-numeroj por la landoj Aŭstria, Bulgara, Estono, Germana, Hispana, Hungara, Jugoslavia, Latvia, Litova, Pola, Rumania kaj Rusia;
5 ET-numeroj por la landoj Belgia, Ĉeĥoslovaka, Finna, Franca, Italia kaj Portugala;
4 ET-numeroj por ĉiuj aliaj landoj.

La pagon ni prenas de la abonkonto. Germanaj poŝtabonantoj pagu 3000 mk. Neabonantoj antaŭpaga egalvaloro de 2 avisaĵ frankoj aŭ 8 stamp. respond-kuponoj. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO. Al gesamsideanoj Siedl en Wien post 17-jara edeco naskiĝis unua infano nomita Heriberi. [2]

EDZIĜO. S-ano Henriko Fordonski el Lodz edziĝis kun f-ino Roma Merenholtz, Lodzanino, la 31. 1. 23. [2]

ANGLAJ GEPATROJ ATENTU! Francal geinstruistoj deziras akcepti en sia familio dum liberiempo (aŭg.-sept.) junan anglon 14-17-jaran dezirantan perfektigi en franca lingvo kaj interŝange progresigi ilian filon pri angla lingvo. Familianeco kaj komforto certigata. Agrabla restadejo. Ne spekuldo, sed eduka interservo. Korespondas esperante kaj angle. Skribu al M. Boubou, 96, rue St. Marceau, en Orléans (Loiret) (Francujo).

BRODAĴOJ. Belaj avisaĵ brodaĵoj po kilogramo 50 av. fr. sendas kontraŭ pago de ĉi tiu sumo Charles Weyermann, Rorschach, Svisujo.

SAMIDEANOJ! Kiu el vi povas min informi pri la sorto de mia amiko Andrei Seur, militkapitula esto, kies lasta adreso en marto 1917 estis: Czerak i. Westpr. Hospitalo No 21, barako No. 11a (persona n-o 99696) Germanujo. Skribu al s-o Konst. Keilermann, Masau, en Keruse (Eslando). [5]

LIGNO. S-o E. Stanowsky, 10 Copernicusstrat 10, 'a-Gravenhage (Nederlandoj) deziras aĉeti malnovan lignon, por fabriki violonojn kaj demandas prezojn.

SE VI DEZIRAS certe kompreni Sanktan Skribon, kaj povas juĝi por vi mem, skribu al Broughton, 140 Wiggin Street, Birmingham, Anglujo. Senpage Esperanta Litteraturo estas preparata.

GERMANA KOMERCA KOMIZO 25-jara, scianta la hollan-
dan, anglan kaj rusan lingvojn, librotendadon, skrib-
maŝinon ktp. kun bona manakribo serĉas konvenan
oficon. Ofertoj al Hermann Walther, Dresden-N, Alaunstr.
104 II I.

ALIĜU TUJ al nova (6-a) eldono de „BES-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj“! — Unu enakribo 0.50 Fsv., por malbonvalutuloj 0.25 Fsv., senpage por aĉetintoj de 4-a eldono! — Postulu prospekton de „Bohema Esperanto Servo“, Moravany (Boĥ.), Ĉeĥoslovakujo.

Korespondo kaj Interŝango.

S-o Stanislaus Malewski en Wilno, str. Wileńska 27-7 (Polujo) interŝangas posim. kun tuta mondo. Por bona pm. sendas bonajn pm. de Polujo kaj meza Litovujo. Ne akceptas difektajn. [2]

S-o P. B. Gorchs, str. Claris 55, en Sabadell (Hispanio) deziras korespondi ĉiuteme kaj interŝangi p.k. nacigazetojn nacifigetojn, propagandilojn Esperantajn kaj ĉiujn Esperantojn kun la tuta mondo. Informas pri komerco. [2]

Gino Sodini, Via della Vigna Nuova No. 1 en Firenze 4 (Italio) deziras interŝangi poŝmarkojn kun ĉiuj landoj. [2]

Soluta pola partoprenonto de la XV-a indulgema por ĉiuj aĵn kolektpasilo, deziras antaŭkorespondadon kun alilanduloj (inoj), celante interkonsilion en Nürnberg. D-ro H. Brodero, Warszawa (Polujo), Marszałkowska 44/7.

Franco Atanas Ivanov en Petrič (Bulg.) deziras korespondi per il. p. k. kaj lertoj ĉiuteme kun gejunuloj ĉiutemaj. Li ne interŝangas p. m.

Gekamaradoj tutmonda atentul! 16-jara junulo deziras korespondi per l. kaj il. p. k. kun junaj komunistoj. Koĉo Popov en Petrič (Bulg.)

F-ino Gerda Spiess, Danzig, Goldschmiedegasse 25 (Freistaat Danzig), 17-jara, deziras interŝangi vidadkartojn lertojn, poŝmarkojn kaj gazetojn kun ĉiuj landoj.

Ĉiu kiu sendos al mi 20—100 poŝmarkojn krom germanaj kaj ĉeĥoslovakaj) ricevos samvalore poŝajn kaj rusajn. Ĉion adresu: L. Lange, Nieswiez (Polujo) Benedykt. 5.

Geza Ulicska, ĉe R. Munk C. P. R. Carausche (Rumanio) interŝangas papermonon, posim. kaj pejzaĝbildojn. [2]

Aŭstrialio. — S-o Chas J. Bradley, 18 Elgin Avenue Armadale, Melbourne, deziras korespondi kaj interŝangi poŝmarkojn, poŝkartojn ktp. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

Vilhelmo D'haese, Wasmünster (Belgujo), deziras aĉeti sanktajn bildojn prefere el Germanujo kaj Aŭstrialio, bonvolu sendi apcimentojn kun prezoj. Mi sendos 500 diversajn poŝmarkojn afankite por 4 frankoj aŭ egalvaloro, interŝangas poŝmarkojn.

Kun amikoj el „Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj“ (ankaŭ el aliaj kristanaj unuigoj) de la tuta mondo serĉas korespondadon Bruno Beckmann, Berlin-Charlottenburg, Wilmersdorferstr. 152, Germanujo.

W. J. Beyers, Nieuwe Schoolstraat 18 g, den Haag, Holando, deziras interŝangi poŝmarkojn kun aerioza kolektilisto de aliaj landoj. Ne Germanujo aŭ Polujo.

S-o Alf. Sover, Nömme, Estonio, deziras interŝangi poŝkartojn ilustr. de ĉirkaŭaj, naciajn ĵurnalojn, moneretojn ktp.